

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture
sociale sans frontières.*



31/03/2018 – 3/04/2018

70^a KONGRESO de SAT-AMIKARO en PARIZO



Kongresejo



La Bellevilloise *



Librejo de SAT-Amikaro

* *Fondita en 1877 post la «KOMUNUMO», La Bellevilloise, unua pariza kooperativo, celis ebligi al modestaj homoj, ke ili atingu politikan edukon kaj kulturon. SAT, en la komenco, antaŭ sia nuna sidejo havis sian tiaman tie.*

Vegane kuiru ! Energibuloj sezampastaj kaj daktilaj

160 g da migdaloj
12 meĝul-daktiloj (vario tre dolĉa k
mola)
80 ml da kokosoleo
40 g da sezampasto
20 ml da acersiropo
25 g da nigresamsemoj

Preta post 5 min,
20 min da atendo,
por 18 buloj.

Senkernigi la daktilojn. Haki la migdalojn en meĥanika hakilo. Aldoni la aliajn ingrediencojn krom la sezamsemoj. Aspektas dikpaste. Buligi kaj ruli en sezamsemoj. Post 20 min en la malvarmŝranko, prezenti la bulojn.

Recepto farita kaj verkita de Paŭlino por La Sago.
Aprobita kaj fotita de Vito kiu kuraĝis frandi plurajn el ili.
Kaj aprobegita de Dominiko, la patro de Paŭlino, kiu enamiĝis je tiu dolĉaĵo (kvankam mem ne vegano).

Transsendis Vito



**Kun ĉi-numero la
(re)aliĝ-bulteno !
Ne prokrastu
sendadon de via
kotizo !**

Kiel traduki idiotismojn

P

En ĉi numero de La Sago la laŭ mi tute artefarita OKK de Pariza kongreso - kiun mi taksas ne nur misa, sed plie iel fia - petis aperigon de kvin plenaj paĝoj (el kiuj la kovrila). Tion mi evidente ne rajtas rifuzi, tamen nenio devigas min kontribui en la aranĝa engaĝigo : ĉar ja estas limo en mia kapablo «engluti kolubrojn» !

Fakte jen bona okazo trakti tiun idiotismon «avalier des couleuvres».

En la tre trafa libro de Lucien Bourgeois «Esprimaro Franca-Esperanta» (*Cercle Amical Espérantiste FR-47470 Beauville -1997 -*) ni trovas (p13 §130) la malidiotisman esprimon: «glate gluti ofendojn», al kio mi volonte aldonu «aŭ malagrablajojn» ĉar la franca esprimo ne uziĝas nur por ofendoj.

Ĉi esprimo eĉ nuntempe glitis al «naive taksaj veraj ajnaj asertojn».

Nu se tiuj «tradukajoj» havas la avantaĝon esti kompreneblaj internacie, ili bedaŭrinde perdas iom da suko, kiun havas la originalo.

Sed ĉu eblas trovi sukan esprimon internacie kompreneblan ?

Por tio, ni unue serĉu al kio oni ŝuldas la idiotisman formon. La plej ebla fonto ŝajnas esti en la malnova dua signifo de la franca vorto «couleuvre» = «perfida aludo», ĉi tio mem pro ebla simileco kun «couleur» (koloro) en signifo de «falsa ŝajno, perfido» kune kun la malfamo de la kolubro, kiu instigis Evan manĝigi pomon al Adamo.

Se sin apogi sur la tabelo rete trovebla ĉe www.expressio.fr/expressions/avalier-des-couleuvres.php, la plej ofta bildeca esprimo konsistas en ŝanĝo de «kolubro» al «bufo» >> engluti bufojn. Fulmo ! Jam Francoj estas nomataj «ran-manĝantoj» tio povos rapide gliti al «buf-glutantoj» !

Feliĉe aperis malpli ofta esprimo, sed kiu ŝajnas al mi multe pli internacie komprenebla, tio estas «engluti la hokon, la fiŝfadenon kaj ties plumbajojn». Ja tiu esprimo pli rilatas al la signifo «naiva» ol al la «submetita».

Mi lasas al vi la parolon por proponi pli drastajn aŭ pli taŭgajn sukcesajn esprimojn !

Antiteze , kaj amuze, jen la blazono de la fama itala familio Visconti:



El argento kun kolubro el lazuro kronita el oro, glutanta infanon el karna koloro.

Tiun blazonan priskribon mi elektis el la multaj kiun oni povas trovi, pro ĝia simetrio al la franca esprimo, sed kiu ne estas la plej blazonece rigora.

Inter la diversaj priskriboj, pri la besto, oni trovas jen «serpento» sen precizigo pri la specio, jen kolubro -ĉar ja ĝi aspektas pli «kolubre» ol «vipure» (laŭ la du nuraj specioj troveblaj en tiamaĵ blazonoj). Pri la infano en ties faŭko, oni trovas en la priskriboj jen ke ĝi estas «englutita» jen ke ĝi estas «elvomita»...

La nomo de la serpento en la itala heraldiko estas «biscione» (aŭ «bisa») kiu fontas el la latina «vipuro» kaj kiu sone proksimas al «Visconti»...

Tiu latina vorto «vipera» naskis multajn nomojn da fantaziaj bestoj kiel «bisse» «givre», «guivre», «vouivre», «wyvern» kiuj tute ne plu similas al vipuro, sed estas jen kolubro, jen pli malpli fantastaj bestoj el la familio de la serpentoj/drakoj.

En franca heraldiko, «guivre» (= «givre») specialiĝis kiel «*serpento (kolubro) palise (vertikale) ondanta kun supra duono de knabo desegnita el ĝia faŭko*» Tiun infanon en la franca heraldiko oni nomas ties «issant», kiuj bezonus neologismojn en Esperanto (ekzemple «givro» kaj «elajo») por pli rigora heraldika priskribo:

El argento kun givro el lazuro ties elajo el karna koloro kaj kronita el oro.

Sergo

Nova jaro, La Sago sur novaj reloj...

La inta tutkolora numero de La Sago (118) ricevis laŭdojn kaj kuraĝigajn mesaĝojn. Ĉu iam ni sukcesos liveri gazeton tute kongruan al nia legantaro?

Ĉi-numere, malaperas «Misŝuoj», ne nur pro manko de loko, sed ankaŭ ĉar ne troviĝis volontulo por ĝin tajpi - sed ĉefe ĉar ĝi montriĝis ne tre kongrua al aperigo felietone. Ni serioze studas kiamaniere pluvivigi ĝin sub formo de libro, papera aŭ reta. Anstataŭe ni trovis oportunecon tute trafan en la laboro de la Montendra grupo gvidata de Janine Dumoulin, kiu laboras en tradukado de la verko de Philippe Delerm « La unua engluto da biero kaj aliaj etetaj plezuroj ». La avantaĝo de ĉi-elekto kuŝas en la fakto ke ĉiuj ĉapitroj estas ne nur multe pli mallongaj, sed krome sendependaj unu de la aliaj - kio ebligas legi unu ĉapitron sen la bezono koni la antaŭajn - tamen instigante al legado de la aliaj pro la plezuro (iom pli ol eteta !) trovi plaĉajn enscenigojn de aliaj etetaj plezuroj.

Ankaŭ malaperas «Libro vivas pli ol...» de Ĵak Le Puil, sed espereble nur provizore : nia kamarado malfeliĉe kuŝas nun en hospitalo, pro sufiĉe grava malsano. Ni povas nur deziri al li resaniĝon kiel eble plej rapidan...

Ŝajnas ke pli kaj pli precize klariĝas kiamaniere La Sago povas plenumi sian kontribuon al unu el la du ĉefaj celoj de SAT-Amikaro, nome plibonigon de la lingvo-nivelo de ĝiaj legantoj, kaj tio ne per «lecionoj» - ja gazeto ne estas lerno-libro, nek per longaj rakontoj, ja gazeto ne estas romano-libro - sed helpe al la

legantaro, en rilato kun la specifeco de SAT-Amikaro, kies anaro konsistas el esperantistaj francparolantoj. Mi klarigas :

Oni ofte aŭdas ke francparolantoj estas privilegiitaj en uzado de Esperanto pro granda simileco de la vortoj. Tio sendube veras por kompreni, sed tute ne por paroli : ne nur svarmas la falsaj amikoj (inciter/instigi, inciti/agacer), ne nur svarmas la malsamaj formoj kiuj similas al la franca (ekzemple por «chan» : changer/ŝanĝi, chanter/kanti, faire chanter/ĉantaĝi...) sed krome svarmas en la franca idiotismaj formoj, absolute ne tradukeblaj laŭvorte...

Ĝuste, pli kaj pli evidentiĝas, ke tie kuŝas la pedagogia rolo de nia revuo : helpi al nefranca pensmaniero, kutimigi al lokalizado de idiotismoj (kiuj iafoje tute ne aperas tiaj !) kaj al ties traktadoj.

Kelkaj plu bedaŭras ke La Sago ne (aŭ tre malmulte) plenumas la alian celon de SAT-Am, nome varbi por SAT, sed tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ni ne (aŭ tre malmulte) ricevas artikolojn en ĉi direkto, ĉar se facilas en ajna teksto lokalizi idiotismajn esprimojn, ne facilas eltiri el ekz. kuir-recepto aŭ rakonto pri travivaĵo, elementojn kiuj instigas al aliĝo al SAT, se la aŭtoro ne celis mem tion fari...

Tio kondukas al evidenta konkludo : nia revuo dependas ĉefe de siaj kontribuantoj, tio estas vi mem, la legantoj.

Por la redakta teamo,
Serĝo.

Enhavo


SAT-Amikara kongreso 2018	1
Diversaj artikoloj/informoj	4-7
Reago al Fina bilanco (LS118)	7
<u>El nia leter-kesto</u>	8-9
<u>El la Delermaj etetaj plezuroj</u> §1	13
Ideoj / Rakontoj / Informoj	
Galeruloj kaj galeroj (2/2)	6
Pedagogio	
Slipoj	9-10
Utilaj informoj	10
<u>Libro-servo</u>	
Tagoj kaj ruinoj	8
Antaŭ unu jarcento	8
Kulturo, diversaj	
Vegane kuiru	2
Kiel trad. idiotismoj	2
Tra la fenestro	11
Flor-bukedo	16
Humuraĵoj	
El ŝercaj anekdotoj..	9
Selle-Humuraĵoj	13
TeStudo, B.D. far Sir'	16
Plu moviĝas la movado	
E-Centro / Nilvange prelego	14
Z-Festo Anĝevo / Greziljono / Jubileo Esperanto -Gironde	15

NIVELOJ

Ĉiuj artikoloj estas akompanataj de lingv-nivela simbolo :

K = Komencantoj
P = Progresantoj
S = Spertuloj

kun asterisko se tradukata franclingven aŭ kun glosaro por lingvaj malfacilaĵoj.



LA SAGO.

CPPAP n° 0322 G 86224. ISSN : 1763-1319.

SAT-Amikaro, 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris

Directeur de la Publication : Serge Sire

Imprimé par :

Parbleu! /Ravin Bleu 75017 Paris

Dépot légal à parution.

Krom paĝoj 1, 4 ĝis 7 sendataj de la Organiza Kongresa Komitato en Parizo :

Ĉefredaktanto kaj enpaŝiganto Serĝo Sir'.

Redakt- kaj kontrol-skipo: Janine kaj Yannick Dumoulin, Lucette Échappé, Luk' Gouverneur, Ĵak LePuil, Petro Levi, Serĝo Sir'.

Partoprenis en ĉi numero: Andreo Andriu, Janine Dumoulin, P. Grollemund, Bruno Henry, Karolin', Izabel' LamiRested', Vito Markovo, Guy Martin, Marcelo Redulez', Jean Selle, T.ereza Sabatier, Serĝo Sir'.

La Sago 119. Jan.-Feb.. 2018 p3

Kontribuaĵoj

Ĉiam bonvenaj! Sendu ilin al la redakta korespondanto :

Poŝte : **S.Sire, 85 imp des fées, 74330 Sillingy**, Reto : **lasago@free.fr**

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF-, ODT- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG-, PCX- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikigeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de la paraj monatoj ne povas esperi aperigon en la tuj sekvonta numero.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Contributions

Toujours bienvenues! A – faire parvenir au correspondant de rédaction :

Poŝte : **S.Sire, 85 imp des fées, 74330 Sillingy**, Reto : **lasago@free.fr**

■ *de préférence par internet, textes en format RTF, ODT ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG, PCX ou GIF.*

■ *éventuellement sur papier par poste, les textes de préférence typographiés sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.*

■ *Les articles reçus après le 20 des mois pairs ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro immédiatement suivant.*

Por ajnaj rimarkoj/kritikoj Pour toutes remarques/critiques (sed ĝentilaj) lasago@free.fr (mais courtoises)

La Florbukedoj de Marcelo



Clématite vigna blanche

Voici la plus ordinaire des clématites. On la trouve dans les forêts de feuillus et dans les haies jusqu'à une altitude de 1600 m. La plante peut mesurer jusqu'à 10 m. C'est pourquoi les clématites sont considérées comme les lianes de la flore française !


P*



Silène enflé ou Claquet

Plante pionière, le silène est capable de conquérir un sol pauvre, instable. Ses fleurs sont souvent toutes orientées dans la même direction. Remarquez le calice enflé similaire à une outre, qui reste après la floraison. Le vent le pénètre et ainsi secoue les graines de la capsule. Feuilles et jeunes pousses se cuisinent comme légumes.

Testudo
pseŭdosciencia
Bilda Deliraĵo
\$09 far Sir'



K*

*Testudo = tortue / Test-studo = étude par tests.
*Moi je voudrais bien, mais faut que j'demande à ma mère (laŭ popola kanto: "Viens, Petite, j't'emmène au cinéma")

*ĝen'etika = gène étique
*genetiko = génétique
*Ĉio ŝvebas = (tout plane) = ça baigne pour moi...